

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.—; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-  
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

## JINDE A U NÁS . . .

Mám před sebou zajímavou brožurku. Jmenuje se „Statistik für das Jahr 1927“ a hned pod tímto nadpisem čtu „Statistiko por la jaro 1927“. A tak je psána celá: německy a esperantem. Vydal ji „Esperanto-Asocio de Saksaj instruistoj“.

Podívejte se se mnou na její obsah!

Hned v předmluvě, kterou napsal správce školy a samideán Walter Hahn (Gohlis — Drážďany), známý řečník z loňské pražské konference „Školou k míru“, čteme radostná slova úspěchu:

„... Esperanto dosáhlo úspěchu také v saských školách. Téma „Esperanto a jeho význam pro školu a učitelstvo“ bylo na programu četných učitelských schůzí. Konány přednášky, kursy pro učitelstvo a pracovní kroužky v mnohých místech. Počet členstva „Esperantského svazu saských učitelů“ vzrostl za 10 měsíců o 60%. Stavovské (učitelské) časopisy často referovaly o esperantu. Nejvýznamnějším ze všeho byla přízeň ministerstva školství, které nejen vyslalo oficielní zástupce na výroční schůzi Svazu saských esperantských učitelů, ale i finančně podporovalo učitelské kursy esperanta.“

A jinde píše: „Pedagogický ústav při škole vysokých studií v Drážďanech“ tolik jako naše učitelská pedagogia „má nejen kursy esperanta pro své posluchače, ale i na cvičné škole je vyučování esperanta zavedeno...“

Tolik v předmluvě.

Další stránky zajímavé brožurky vy-

čerpávají stav členstva Svazu saských učitelů-esperantistů, jehož počet dosahuje v roce 1907 kol 800, pak místa s vyučováním esperanta a to soukromě, nepovinně a povinně.

Celkem bylo esperantu vyučováno v 80 národních školách a to v 5 školách povinně, v 7 soukromě a v 68 nepovinně.

Vyučování na středních školách jeví menší výsledky: v 5 soukromé a ve 4 nepovinně zavedení esperanta.

Z používaných pomůcek převládá učebnice Streidtova, pak daleko menší měrou Schönherrova, Degenova a na jednotlivých místech i Bord, Möbuss, Otto a Dietterle. Ve 2 školách učící učí podle své vlastní metody.

Posléze najdeme v brožurce i stanovy Svazu.

Takové je to tedy v Sasku, v části Německa, které svou rozlohou je 10× menší naší republiky a má jen přes 4 mil. obyvatel.

A u nás? Nemám přesných dat o výsledcích vyučování esperanta na československých školách (pokud vím, Svaz již podnikl akci za tím účelem) a také mi není známo, kolik jest organizovaných učitelů v našem Svazu. Jen vím, že je nás málo, velmi málo.

Podle posledních dat máme v republice 38 státně zkoušených učitelů a učitelek české národnosti.

Příčina?

Představte si, samideáni, co bychom dělali, kdyby počínaje příštím školním rokem bylo všeobecně esperanto zavedeno na našich měšťankách? Jen na měšťankách —

(Konec na straně 59).

J. S. MACHAR:

**PROFETAJO.**

En mi post edziniĝo ŝia  
vekiĝas knaba rememor',  
kaj tono sibla, ironia  
resonaŝ ofte en la kor'...:

En eta vivas mi vilaĝo.  
Krepusko estas en ĝarden',  
kaj pendas super la pejzaĝo  
minaca nuba baldaken'.

Jen ciganino sin klinetas  
al mia mano trans la mur'  
kaj observante ĝin profetas  
per voĉo plena de terur':

„Linio krucas jen alian  
en kurioza manier' —  
vi bridu fidemecon vian,  
aŭ certe mordos vin viper'!“.

Foriris ŝi. La knaboj moke  
babilis pri la antaŭdir'.  
Mi ankaŭ ridis reciproke  
(kun iom retenata spir'!).

Sed poste, se tra bosk' betula  
mi vagis, aŭ sub alta pin',  
kaj se serpento strangmakula  
sur mia voj' sunumis sin,

aŭ se alia tia besto  
trankvile dormis ĉe river',  
aŭ volve rampis el la nesto,  
svingante langon kun koler',

mi forkuregis senkuraĝe,  
en mi tremetis la anim'...  
Ho, tiam aĝis mi malsaĝe,  
senkaŭza estis mia tim'!

Min ne ekmordis reptilio...  
Sed vi, vi, mia ĉarmu'in',  
ĉu vi naskiĝis nur por tio,  
ke l' antaŭdir' plenumu sin?...!

Tradukis M. Lukáš.

FR. LANGER:

**RUZEGA TROMPISTO.***El la ĉeĥa: Dr. St. Kamaryt.*

Kiam ili diras pri mi, ke mi estas  
ruzeĝa trompisto, do mi, sinjoro komi-  
sario, preferas diri al vi ĉion laŭorde  
mem. Rakonti tion mi jam scipovas bo-  
ne, mi ja rakontis tion almenaŭ al kvin-  
dek personoj, ĉar tio ja estis la plej  
sukcesinta petolaĵo, kiun mi dum mia  
vivo spertis. Do mi jam havas tion  
en la kapo ordigitan, ke neniu ĵurna-  
listo tion kunmetus pli bele.

Mi loĝas ĉe mia kamarado Sojka en  
Holešovice. Nome li lasas min dormi  
sur kanapo, ĉar mi estas jam la trian  
monaton sen posteno kaj mi ne havas  
loĝejon. Antaŭ dek tagoj, ĝuste tiun  
vesperon, li diris al mi: „Rudolĉjo, ho-  
diaŭ venos al mi iu sinjorino, do mi  
ne povas bezoni vin hejme antaŭ nok-  
tomezo. Jen kvin kronoj, kaj iru por  
tiu tempo ien en kafejon!“ Mi prenis  
la kvinkronon, pruntiĝis lin al mi pu-  
ran kolumeton kaj intencis foriri.

Tiam mi ricevis ideon: Mi havis tian  
malnovan grandan monujon. Kiam mi  
havis postenon, do mi portadis en ĝi  
mendilojn, poŝtpagilojn kaj s.milajn pa-  
perojn, ĉar mi sciis, ke mi pli bone  
impresos ĉiun, kiu observos, ke mia  
surtuto supreniĝas super la monujo. Mi  
diris al mi, kiom agrable estus ree unu-  
foje imponi al iu. Eltiri ekzemple en  
kafejo, kiam mi pagos, plenan monu-  
jon, meti ĝin antaŭ min, kvazaŭ mi  
volus elpreni el ĝi ian grandan bank-  
noton, kaj nur poste diri al la ĉef-  
kelnero, kiu staros apud mi: „Mi ja  
devas ie en poŝo havi kelkajn mone-  
rojn!“ Kaj nur poste mi elkaptus el  
la veŝta poŝo la kvinkronon de Sojka.  
La ĉefkelnero estus plena de respekto  
kaj tio farus al mi treege bone. Kiam  
oni iradas dum tri monatoj laŭ iaj a-  
noncoj kaj ankaŭ so'e sen ia ajn pre-  
teksto, kaj petaĉas ĉe ĉeĥoj kaj pro-  
kuristoj pri ia posteneto de agenteo aŭ  
enkasiĝisto aŭ pri io simila, kaj oni  
estas dum tri monatoj ĉie malakceptata  
kaj elĵetata, tiam oni terure bezonas,  
ke iu onin estimu almenaŭ por mo-  
mento. Tiel do mi, antaŭ foriri en la  
kafejon, distranĉis malnovan ĵurnalon

je diversaj folietoj kaj plenigis per ili mian surbrustan monujon.

En kafejon mi iris en Letná, tie estas tre decaj. Mi eltrinkis la kafon kaj legis la ĵurnalojn. Sed mi eĉ ne povis ĝisatendi la momenton, kiam mi estos paŝanta, precipe kian mienon mi ĉe tio faros. Ne estis ankoraŭ duono de la deka, kiam mi ne povis venki mian malatendemon, kaj mi vokis la ĉefkelneron. Ĉio estis, kiel mi imagis al mi. La ĉefkelnero tute alimaniere stariĝis apud mi, kiam mi la monujon eliris, kaj li preparadis la sian, por povi redoni al mi la monon. Kiam mi poste elmetis la kvinkronon kaj diris, kion mi elpensis, do li respondis: „Tio ne malhelpus, ni povas ŝanĝi ĉiun moneron, laŭ ordono.“ Ho, tio ĉi efikis tre bone, tiu ĉi „laŭ ordono“ kaj „ĉiun moneron“, nu mi donis al li duonkronon kiel trinkmonon kaj li helpis al mi en la palton!

Elirinte, mi finkalkulis, ke restis al mi unu krono, kelkaj dudekkeleroj kaj du horoj por atendi la noktomezon. — Sed mi sciis, ke en la Antikva kvartalo estas malgrandaj kafejoj, kie kafo kostas kronon, ke tien mi povus iri kaj ankoraŭ unufoje ludi kun la ĉefkelnero tiamaniere. Do mi tien iris kaj en iu strateto mi trovis ian tian kafejon. Ke tie kafo kostas unu kronon, eĉ pendis skribite sur la pordo. En la kafejeto sidis sum-sume tri homoj, enkalkulante eĉ la posedanton. Mi eltrinkis la nebonan kafon kaj poste por iel klarigi antaŭ ili, kial mi sidas kaj ne foriras, mi rigardadis la pordon, kvazaŭ mi iun atendus. Kaj ĉar mi ne povis daŭre rigardi la pordon, do mi alterne eltrinkis mian dikeĝan monujon. Iu el tiuj tri povis hazarde ekvideti, kiamaniere mi en ĝi foliumas, kaj li certe mirus, kiom da mono mi havas, kaj nenion alian mi volis.

Efektive, unu el tiuj homoj tion ekatentis, kelkfoje min rigardis, poste ekstaris, kaj iris al mi. Li portis frakon, do li estis ia kelnero. Li komencis interparolon kun mi, ke mi verŝajne tie ĉi iun atendas, kaj ĉu mi ne estas en Praha fremdulo. Kaj ĉu mi ne volus ie amuzi? Nu kaj mi ludis mian rolon laŭ mia plena monujo. Ke mi estas ĉi tiea, sed ke mi efektive iun atendas,

La longa paŭzo en la eldonado de La Progreso estis kaŭzita de grava limigo de mia libera tempo, pro ŝanĝo en mia profesia okupo kaj pro malsano. La ĉiama manko de regulaj kunlaborantoj igis neebla subite likvidi la laborojn prokrastitajn. — Nun rapide sekvos la ceteraj n-roj kaj poste mia unua zorgo estos la regula aperado. — Mi esperas, ke nun ankaŭ la resto de la suldantoj pagos la abonon 1928. Treege plifaciligis la financan situacion tiuj kiuj abonis jam por 1929. Bv. ilin sekvi ĉiuj ceteraj amikoj de La Progreso.  
R. H.

Sed ke poste mi iros kun mia kamarado hejmen, ĉar mi havas ĉe mi multan monon el gajno de la konstrua lotobileto, kaj ke kun tiom da mono ne estas konsilinde ien iradi. Kaj nun valoris aŭskulti, kiel li estis plena de „bonvolu“ kaj „moŝto“, ke tiom da respekto en unu momento mi ankoraŭ neniam aŭdis. Mi kvazaŭ banis en lia parolado, tiom agrable estis por mi. Fine li komencis insisti, ke mi venu sen ia zorgo en novan belan likvortrinkejon, kie li estas ĉefkelnero, nome „Ĉe tri puloj“. Ĝi estas, dirante la veron, ĉe limo de Vinohrady, sed li asertegis min, ke mi tie tre bone min amuzos. Do, por ke mi forigu lin de mi, mi diris, ke se mia amiko konsentos, ke ni vidos la aferojn ĉe li. Tiam li leviĝis, faris komplimenton, kaj ke li tute certe atendas nian afablan viziton, ke li preferas iri antaŭe en la trinkejon por ĉion kontroli, kaj ke mi estos kun la amuzo certe tre kontenta. Tiel li foriris, kaj daŭre komplimentadis eĉ en la fenestron, apud kiu mi sidis. Ĝi estas brilega, tiele senti sin sinjoro, kaj mi estus volinta trakti en tiu momento kun iu proprulo de firmao pri posteno. Mi aspektus tute alie ol mi ĉiam aspektas. Sed kompreneble mi diris al mi, ke mi sidos tie ĉi ankoraŭ ĝis ĉirkaŭ la duono de la dekdua, kaj poste iros malrapide hejmen en Holešovice.

Do mi sidis ankoraŭ rimarkindan tempeton. Poste malfermiĝis la pordo, eniris iu aŭtomobilkondukisto, ĉirkaŭrigardis la kafejon kaj subite turnis sin al mi. Ke lin sendas sinjoro ĉefkelnero de „Tri puloj“, ke li devas venigi iujn unu aŭ du sinjorojn. Al tio mi: „Mia kamarado ankoraŭ ne venis, kaj mi sen li nenien veturos. Cetere, se li baldaŭ ne venos, mi devos serĉi lin.“ Sed la aŭtomobilisto proklamis, ke li min atendas, kaj se mi irus serĉi la kamaradon, do ke li veturos kun mi, ke la ĉefkel-

nero diris al li, ke li ne devas reveni sen ni. Post tio li eliris kaj sidis en aŭtomobilo. Mi havis tian impreson: „Atendas vin aŭto!“ Tio al mi ankoraŭ ne okazis. Tio ja estas eminenta. Kaj tuj mi ekpensis, ke fine mi povas en tiun Vinohrady tamen veturi kaj diri al la ĉefkelnero, ke mi devas iri hejmen. Ĝi tamen estas ĉirkaŭiro en Holešovicen, sed tio ne malhelpas, se mi ĉe tio unufoje en la vivo veturos tra Praha en aŭtomobilo.

Do mi ree eltiris mian grandan monujon kaj poste elprenis el la veŝto ĉiujn restintajn moneretojn; la kafej-mastro riverencis, malfermis la pordon por mi, la aŭtomobi'isto ekirigis la motoron, kaj tio ĉio, dum mi havis en la poŝo eĉ ne groŝeton. Ĉar iam iu rigardis min en la aŭtomobilo, mi ordonis al la kondukisto, por tion pli uzi, veturi trans la Venceslaa placo, kie estas tiutempe multaj homoj. Ankaŭ mi ekpensis, ke ni povus halti apud iuj kafejoj, ĉu mia kamarado tie enestas, ke mi per tio ankoraŭ plilongigu mian veturadon. Ĉiam la homoj vidante min elpaŝi el la aŭtomobilo rigardadis, kaj kie el la kafejo oni ekvidis, ke mi venis en aŭtomobilo, tie la kelneroj tre volonte respondis al mi, trairadis kun mi tra la kafejo, ĝentilis al mi, demandis unu la alian, ĉu iu konas la sinjoron, kiun mi serĉas, tiom, ke efektive ŝajnis al mi, ke mi havas iun amikon. Mi iradis bele rekte kaj mi rigardadis tiujn belajn ejojn, kvazaŭ ili neniel estus maloftaj por mi kaj kvazaŭ okazus ĉiutage, ke homoj saltas ĉirkaŭ mi. En la lasta tempo mi ja naŭzigis min pro mi mem, ke mi ne scipovas trovi ian postenon al mi kaj ke mi estas tia mizerulo!

Kompreneble ni trovis neniun, kaj tiamaniere ni alveturis al la „Tri puloj“. Ĝi estis bela deca ejo, kvankam ne unuaranga, kaj nomon posedis pro la tri puloj, kiuj estis tie pentritaj ĉie sur plafono kaj muroj. Kvankam mi defendis min, tuj kaptis min iaj du knabinoj, kiuj versimile jam estis aŭdintaj pri mia plena monujo, kaj tial ili tenis min tiom, mi parolu kion ajn, kaj kriis, ke ili ne ellasos min. La ĉefkelnero komencis depreni miajn palton kaj ĉapelon, kaj ĉiuj enkondukis min en loĝion fermitan per kurteno. La muziko ludis dum tio fan-

faron, kaj al mi efektive ŝajnis, ke tio decas por mi. Fine mi diris al mi, kial mi unufoje post longa tempo ne satmanĝus kaj iomete ne trinkus, mi ja havas ankoraŭ tute belan arĝentan poŝhorloĝon, ĝin mi povus oferi por tio. Mi devas ankaŭ diri, ke mi estis unu-sola gasto en la tuta ejo.

Do mi mendis malgrandan vespermanĝon kaj botelon da ordinara vino. Knabinoj eĉ ne por momento foriris de mi, unu estis bela, blonda kaj havis nomon Kamila. Ili ridis, karesis min, ĝojkriis kaj vokis pri ĉampano. Mi diris al ili ke laŭvice oni venas al ĉio. Tiam Kamila preskaŭ estus min sufokinta. Sed mi ankoraŭ ne finmanĝis, jam aperis sur la tablo glaciujo kun ĉampano, poste alkuris alia kelnero kun plado de ŝinko, alia kun tortoj, la muziko ludis sen paŭzoj kaj el la trinkejo alkuradis aliaj knabinoj, vokis, ridis, pepis kaj poste komencis verŝi en siajn glasojn kaj enbuŝigi tion, kio estis sur la tablo; ĉiuj homoj en la ejo turnis sin al mi kaj preskaŭ adoris min, kvazaŭ mi tie ĉi ĉion regus. Tion mi vidadis sole en biografo aŭ eble en pensoj, kiam mi estis malgranda knabo kaj oni rakontis al mi la fabelon pri „la tableto pleniĝu“. Kaj mi tiam deziris al mi tian tableton, kaj mi pensadis, kia ĝi estus. Estas ankaŭ eble, ke tempeton mi pensis, ke tio ĉio estas sole mia sonĝo, aŭ ke ia miraklo okazis kun mi.

Unufoje, kiam Kamila ĉirkaŭprenis min ĉirkaŭ la kolo, ŝi eltiris el mia poŝo la monujon. Kompreneble mi ektimis, ke ĉio antaŭtempe malsekretigis, kaj mi komencis krii al ŝi, ke ŝi ĝin tuj redonu al mi. Eble mi estis eĉ pala, ĉar ŝi levis mian monujon supren super kapon, ŝvingis per ĝi kaj kriis: „Tiu ja havas ŝtopitan la monujegon!“ tiel, ke la enhavo povis esti elŝutita. Tamen mi elŝiris la monujon el ŝia mano kaj ŝi diris ĉe tio al mi bedaŭre: „Mi ja nenion ŝtelus al vi el ĝi.“ Bedaŭrindulino! Kaj poste ŝi estis multe pli pacema kaj malsevera, kaj kiam la knabinoj iam diskuris, ŝi kunpinglis la kurtenon per sendanĝera pinglo kaj ni travivis kune belan momenteton. Kaj poste la vivo denove ekkirlis, ja eĉ iaj viroj komencis venadi en la loĝion por vino, verŝajne amantoj de tiuj knabinoj. Da

ĉampanaj boteloj staris apud la muro, kvazaŭ mi posedus komercon de vino. Sed ebria mi ne estis, eĉ ne malmultete, ĉar mi havis tute klaran timon, ke fine ili postulos de mi, ke mi ĉion ĉi pagu, kaj mi meditadis daŭre pri la maniero, kiel mi min el tio eligos. Kaj se io ebriigis mian kapon, do ekskluzive tio, kiom estas bele esti admirata kaj ĉirkaŭsaltata.

Do mi meditis, kiel mi min el tio eligos, kaj kiam mi ion alian ne elpensis, mi diris al mi, ke se mia monujo faris miraklojn ĝis nun, ke ĝi faros ilin ankoraŭ plu. Mi do komencis paroli antaŭ la ĉefkelnero, kiom ĉagrenas min, ke mi ne havas kun mi mian kamaradon kaj nun mi nomis al li grandan noktan kafejon en la strato Na mŭstku, kiun ĉiu Prahaano konas. La ĉefkelnero proponis, ke li telefonos por li aŭ sendos por li iun kelneron, sed mi tuj diris, ke tio ne sukcesos, tiu mia amiko iras tien pro ia dancistino kaj ne lasus sin tiom facile konvinki. Mi mem devus iri por li. Vizaĝo de la ĉefkelnero longiĝis. Mi do komencis el alia flanko, mi ridis, ke mi ja nenien veturos, ĉar mi timas kun tiom da mono veturi dum nokto tra Praha, precipe se mi havas en mi iom da vino.

„Eble sole tiam, mi diras, se Vi estus tiom afabla kaj se Vi la monon por mi konservus.“ Kaj tiam la longiĝinta vizaĝo de la kelnero ree ricevis sian kutiman aspekton. Se oni estas dek jarojn komercvojaĝisto, oni finlernas legi el la vizaĝoj kvazaŭ el libroj. Kaj tiam la ĉefkelnero, kiu jam ĉesis timi pro perdo de la bona gasto, demandis: „Nu, kaj kiom da mono nome vi kunportas, moŝto?“

Certe ĉie kaj ĉiam estas ĉefa afero bona hazardo. Kaj tio ĉi estis por mi ankaŭ bona hazardo, ke li min demandis, kaj ankoraŭ pli bona hazardo estis, kion mi respondis al li. Mi diris al li nome: „Nu, mi ricevis el la gajno cent mil kronojn kaj nun mi havas ĉe mi naŭdek aŭ naŭdek kvin milojn.“ Mi tion elparolis sen intenco, en la aeron. Mi pensis, ke la ĉefaĵo en la paroleto estos la nombro, sed tuj kiam mi finparolis, estis videble, ke la ĉefa vorto estis la vorteto „aŭ“. Ĉar al la ĉefkelnero ekbrilis la okuloj speciale pro tiu ĉi vorto.

(Daŭrigo.)

MARIE MAJEROVÁ:

## REGINO DE BELECO.

Skribita por almanako „Pět let Družstevní práce“.  
(„Kvin jaroj da Libroeldona Kooperativo“).

Mary Colar legadis kun plezuro dimanĉajn ĵurnalojn. Grandegaj pakajoj da gazetoj kostantaj kvin cendojn po numero konvinkadis ŝin ĉiun semajnon pri tio, ke la mondo estas granda, bela kaj preparita, por ke ŝi valorigu sin en ĝi. La fantazio vestigis ŝin per ĉiuj eblecoj, kiuj sin prezentis. Ŝiaj revoj dancis inter la ĵurnalanoncoj kaj ĉiu zigzaga vojo de espero direktis al iu konkurso. Ĉiam denove ŝin loĝadis la konkursoj en beleco. Ŝia kredo pri sukceso estis firma, ĉar ŝi estis juna knabino, kaj memkomprenebla, ĉar Mary konsideris sin centprocenta Amerikanino.

Ŝi ne intencis resti por ĉiam en ĉi tiu distrikto de New York inter la Unua avenuo kaj Sepdekdua strato. Al ŝi plaĉis multe pli la aŭtomobiloj en la Kvina avenuo ol la brueganta monstro de la subtera fervojo, kiu ŝin ĝenis ĉiutage tri horojn, ĉar ŝi veturadis al City, kie ŝi sidadis ses longajn tagojn en semajno ĉe elektra lumo, unu inter kvin cent maŝinskribistinoj, havante sur la frunto verdan ŝirmilon kaj sur la okuloj rondajn okulvitrojn. Certe, ĉi tiun profesion ŝi konsideris kiel provizoran, ĉar la mondo estis kompreneble kreita, por ke en ĝi regu orhara blondulneto kun haŭto rozkolora ebura, kun fiera starmaniero de virgulino, kun ĉiuj beloj, kiuj deknaŭ jarojn maturiĝadis al elasta freŝeco. Longaj kaj delikataj fingroj destinis Mary-on al sukceso, ŝi havis ja sendifektajn ungojn, ĉar Marie Kolářová, lavistino en la kuirejo de Macalpina hotelo, lavis mem ĉiujn ŝtrumpojn kaj bluzojn de sia filino. En patrine naivega egoismo ŝi preferis ĉarmon de sia ido al ŝia praktika edukiteco. Ŝi favoris al ŝi, kion ŝi mem neniam havis.

Sed pasadis monatoj, longaj kiel jaroj kaj nek feliĉo nek aventuro venis. Ĉiu sezono alportis en modajn monstroŝrankojn sorĉajn allogaĵojn, kiuj kaŭzadis febran pasion en multaj junaj koroj kaj ilian falon. Mary pacienco

atendis deknau jarojn, sed ĝis la dudeka ŝi atendi ne volis. La konkurso pri reĝino de beleco, kiun publikigis „Nedělní hlasatel“ (Dimanĉa heroldo), ŝajnis al ŝi destinita per sorto, por ke ŝi lotmetu kaj gajnu. Ŝi estis miopa simbole kaj reale, kaj la propra bildo en spegulo, kiam ŝi rigardadis ĝin tiom foje, kiom da liberaj momentoj ŝi havis en jaro, estis ĝuste tiel perfekta, por ke ĝi meritu la titolon de reĝino de beleco. Viro kaj virino portas en si idealon de homa beleco, tio estas konata afero. Ĉe virinoj ĝi estas regule ilia propra bildo en spegulo. Pri tio povus atesti egale pramontaraj fontoj kiel spegularaj parioj de urbaj dompasejoj. Mary Colar ne havante spegulon buduaran jesis ilin. Tiel kuraĝigite ŝi ekiris la fiksitajn tagojn, farinte ĉiujn preparojn, kiuj englutis ŝian ŝparaĵon: ŝi surmetis novan tolaĵon, prizorgis la ŝamponadon de haroj (kun frizaĵo por unu dolaro), travivis en sano mankaj piedflegadon kaj iom mirkonsternite, sed tre memkonscie ŝi aperis en halo de „Nedělní hlasatel“, inter severaj rigardoj de fraŭlinoj tie kunvenintaj. Ĉi tiuj rigardoj komencis frapadi ŝin kiel bastonoj, tiel ke ŝia tro alta memfido iom kaŭriĝis. Poste, kiam ŝi en spegula ĉambreto formetadis la vestaĵon, pecon post peco, aperis en grandigitaj dimensioj la mankoj, kiujn ĝi kaŝis: ĉiuj difektoj de haŭto, obstine rezistantaj al kremaoj, neregulaĵoj kaj kriplaĵoj. Ĉu ĉi tiuj speguloj kun seniluzia taga lumigo estas aliaj ol la speguloj en dompasejoj?

Fine ŝi sidis tie en trikoto, en vico de knabinoj. Ili aspektis kiel naĝejoj najadoj kaj en piedoj metitaj sur linolesumo ili sentis malvarmon. Neniu el atendantinoj parolis, ili estis koncentritaj en sin kiel antaŭ konfeso. Ankaŭ la granda konkuro afliktis ilin. Sed la reciproka rigardado ne daŭris longe. La pordo malfermis sin kaj Mary staris antaŭ tri respektindaj juĝantoj, kiujn la redakcio de „Nedělní hlasatel“ estis petinta, ke ili elektu al ĝi la reĝinon de beleco.

Ili estis jam iom lacaj, kiam laŭvice aperis Mary Colar, tremefanta pro ekscito. Ne ŝajnis, ke tri maljunuloj estus estintaj maltrankviligitaj per tiom da nu-

daj belulinoj, kiujn elfluegigis antaŭ ili New York. Ili ekzamenis ilin fakule, indiferentaj al ĉio kiel masaĝistoj en sinjorina banejo. Ili specigis ilin kiel la kuristino specigas pizon. Ili mezuris iliajn harojn sur tibikarno kaj ekzamenis porojn sur nazo. Kiam Mary staris en juĝeja ĉambro, unu eŭgenikisto diris kun rapida rigardo al la tufa ĝia senvualigita belo, kies milono, videbla sub bala vestaĵo, tamen tiom ekscitis ĉiujn junulojn en la ĉefa kvartalo de New York:

„Ni trovas nin, sinjoroj, sur embarasiga vojrenkontejo. Mi opinias, ke hodiaŭ ne ekzistas belaj virinoj kaj entute ne belaj homoj. En koksoj, brakoj kaj kruoj de ĉi tiu generacio, ne parolante pri la kapo, estas videbla duobla postsigno: troŝarĝo per laboro kaj manko de laboro. Knabinoj el laborantaj klasoj ne povas plenumi la kondiĉojn de konkurso, ĉar ili portas es si malbenon de gepatroj kaj pragepatroj troŝarĝitaj per laboro, knabinoj el mallaboremaj klasoj ankaŭ ne, ĉar la manko de laboro malbeligis ilian genton per troa ĝrasiĝo.“

„Al feliĉo la tutmonda milito haltigis ĉi tiun degeneradon almenaŭ en Eŭropo“, respondis la kuracisto. „La nacioj iom miksis la sangon kun la militkaptitoj. El tio estas evidenta, kiom malpravaj estis venkintoj, kiuj volis murdi senescepte la militkaptitojn.“

Mary aŭskultis mirigite ĉi tiujn strangajn parolojn, pri kiuj ŝi opiniis, ke ili ne rilatas ŝin. Senĉese ŝi atendis, ke iu alparolos ŝin.

„Foriru, kara infano“, turnis sin fine la historiisto de l'arto al Mary, kiu ne komprenis, ke la ekzamenado estas finita. „Via patro estas buĉisto kaj via patrino lavistino. Vi ne povas fariĝi reĝino de beleco.“

„Mi aŭdis pri belulinoj, kiuj ne estis el pli bona familio“, ekkuraĝis protesti Mary, kiu malespere vidis, kiel malaperas brilaj rekompencoj, destinitaj al reĝino de beleco, kaj la multpromesanta estonteco.

„Estas eble, ke ili ne heredis tiom mallongan kolon kaj tiom grandajn artikojn kiel Vi. Ni estas produkto de niaj antaŭuloj, kara fraŭlino, kaj la trolaborinteco de viaj antaŭuloj senposedigis Vin je beleco pli frue ol Vi naskiĝis.“

Mary Colar la unuan fojon estis venenigita per ĉagreno el tio, ke ŝi estas filino de Mario Kolářová, lavistino, kaj de buĉisto Jozefo Kolář. Ke ŝi ne elmergiĝis kiel Venuso el maraj ondoj, sed venis en mondon kiel sekvo de kaŭzo, ĉenero, daŭriĝo de aliaj. Ke ŝi estas punita pro kulpo de aliaj, ke ŝi estas kreita el iliaj mankoj, ke ŝi ne estas korpe evoluinta tie, kie ili estis pinĉitaj, kripligitaj kaj supremitaj.

„Ho, kia maljusteco!“ eksingultis Mary Colar kaj du larmoj falis ĝuste sur ŝiajn rozkolorajn mampintojn, kie ili sin altenis. En tiu momento la rapida rigardo de l'eŭgenikisto revenis al ŝi kaj trovis tion tre ĉarma. Akompanante ŝin el pordo, la maljuna sinjoro enŝovis en manon de Mary sian karteton kun adreso frustrante: Venu ĉe mi, kara infano, ni preparolos tion.“

„Ĉio estas relativa, sinjoroj,“ li aldonis iom melankolie. „Ĉiu viro havas en si propran ideon pri virina beleco, kaj estas efektiva feliĉo por homaro, ke ne ĉiuj viroj konsentas pri la sama idealo.“ El la ĉefa:

Rud. Fridrich (Brno-Král. Pole.

Marie Majerová, konata ĉefa verkistino, naskiĝis en 1882. Ŝi eniris en servon al politikaj celoj observis batalon de laboranta popolo pri pano kaj rajto kaj ŝi mem batalis por socialistaj idealoj, frateco kaj lavo de malriĉaj klasoj. R. F.

### KOMERCAJ ESPRIMOJ

Antaŭ nelonge aperinta Komerca vortaro de R. Kreuz kaj A. Mazzolini enhavas 1402 tre fidindajn difinojn de esperantaj komercaj terminoj. Oni malfacile trovas ion korektindan. Mi rimarkis sole eraron pri kemia simbolo de benzino; ĝi devas esti forstrekita, ĉar  $C_6H_6$  estas simbolo de benzolo ne de benzino, kiu povas havi neniun simbolon, estante miksaĵo, ne individua kombinaĵo; benzolo havas krom sia tradicia teknika nome ankoraŭ maldernan nomon respondantan al la nuntempa nomenklatura sistemo: benzeno. La afero estis jam klarigita en Progreso el jaro 1925, paĝo 87. Estas videbla utilo havi nian gazeton ankaŭ por la alilingvaj vortaroj. Anstataŭ la vorto propraĵulo mi preferus propraĵo, kiel estis montrite ĉe mi en pasintjare jarklekto.

Por montri bezonon de la vortaro kaj utilecon de ĝiaj difinoj, mi elserĉis kelkajn terminojn maloftajn en komuna uzo kaj aldoninte la ĉefajn tradukojn, mi ilin redonas tie ĉi:

arch (papíru), foliego  
akcept (směnky), akcepto  
akceptovani, akcepto  
ažio (u cizích peněz), aĝio

ažio (bursovní spekulace s cennými papíry), aĝio  
aĝio  
bicykl, bicikledo  
cent (50 kg), kvintalo; c. metrický, kvintalo  
metra  
cívka, bobeno  
čistopis, neto  
dávka (veřejnoprávní), depago  
defraudace, defraŭdo  
delcredere, delkredero  
deviza (směnka na cizí valutu), deviso  
doze (množství látky, jež se bere nebo dává na jednu), dozo  
etablovati (firmu n. pod.), establi  
etiketa (nálepka), etikedo  
gutaperča, gutaperko  
havarie (lodí), averio  
hoditi zboží na trh, lanĉi varon sur merkaton  
inventář, inventaro  
karanténa, kvaranteno  
klausule, klaŭzo  
komanditář, komanditisto  
komanditní společnost, komandito  
lichva, uzuro  
merciserovati (bavlnu), mercereri  
nádržka, rezervujo  
neskladné zboží, bar-varo  
obrat, spezo  
odbyt, debito  
odbytiště, merkato  
páněv uhelná, baseno karba  
podrobený ciz, dogandeva  
pochutiny, ĝu-manĝaĵoj  
poukázání (peníze k stanovenému účelu), asigni  
ruda, minaĵo  
saldovati, saldi  
smírčí soudce, pacjuĝisto  
specifikovati, specifi  
společenstvo (na př. živnostenské), gildo  
srovnání na hromady (na př. pytle, prkna), stapli  
škuner (loď), skuno  
tuš (barva), tuĉo, hina inko  
na běžný účet, jekonte  
vetešník, brokantisto  
závdavek dáti, enticipi  
zpeněžení (na př. cenné papíry), monigi  
zůžtkovati, ekspluati  
živice, bitumo.

La vortaro kostas Kč 20.— (bindita), kaj estas ricevebla per nia administrejo. S. K.

(Pokračování ze strany 53).

### JINDE A U NÁS.

A kŝyby tedy již při zápisu žáci a zákyně hlásili vedle svého obvyklého: „Budu se učiti němčině, francouzštině, též esperantu.“

A ted' by správy škol bombardovaly úřady o učitele (ovšem, zkoušené). Nastala by shánka po učebnicích, osnovách, příručkách —

Co jen bychom dělali?  
Odpovězte sami!

Julie Šupichová.

## BULTENO

EL ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333  
NUMERO 26. OKTOBRO 1928.

## IV. ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KONGRESO

## OFICIALA MALFERMO

## DIMANĈE

## LA 27. MAJO, EN KURHAUSVERANDA.

Prof. Murath, prez. de la LKK, malfermas la IV. Ĉeĥoslovakon Esperanto-Kongreson kaj kore salutinte ĉiujn ĉeestantojn, pe-as proponi la kongresan estraron.

S-ro Kudela, Olomouc, proponas kiel prezidantojn: S-ron prof. Ing. G. Scholze Liberec, Prez. de GEL kaj S-ron prof. D-ron Stan. Kamaryt-Bratislava, Vicprez. de CAE Kiel sekretariojn: D-ron Ludovikon Goldberger, advokaton en Praha kaj S-ron Vlad. Brambora en Praha. — Konsento.

Ing. Scholze dankas en la nomo de la elektita estraro, salutas (en esperanto) la ĉeestantojn: S-ron Jul. Hirsch, la Urbestron de Teplice-Ŝanov; S-ron Pothorn, la reprezentanton de la Politika Distrikta Komisiono; S-ron Hagelmüller, la reprezentanton de la Komerca Gremio; prof. Beckl, la direktoron de la Komerca Akademio en Teplice-Ŝanov; Prof. Guth, la reprezentanton de la urbeto Řetenice (Settetz).

S-ro Taubmann tradukas la saluton de la prezidanto en la germanan, D-ro Kamaryt en la ĉeĥan lingvojn.

La urbestro S-ro Jul. Hirsch, protektoro de la kongreso, (germane) skizas la historion de la klopodoj por la lingvo internacia; liaj vortoj estas bela propaganda parolado kaj li finas dezirante sukceson al la kongresaj laboroj ne nur en sia nomo, sed en la nomo de la urbo kaj de la loka lerneja Konsilantaro.

La germana parolado de la Urbestro estis tradukita al la kongresanoj de Ing. Scholze, kiu finas: „La ŝatata sinjoro urbestro, eĉ ne estante esperantisto, faris mem tiel bonegan propagandan paroladon ke niaj laŭprogramaj propagandaj paroladoj preskaŭ estas nebezonaĵoj.“

Dankojn de la Kongresa prezidanto al la Urbestro tradukas en la germanan S-ro red. Taubmann, en la ĉeĥan D-ro Kamaryt.

Prez. Ing. Scholze: Estas bela kaj agrabla devo ĉe niaj kongresoj sendi salutan telegramon al nia ŝtata estro. Mi petas D-ron Kamaryt prezenti la tekston.

D-ro Kamaryt: la teksto estas jena:

„Pan president republiky v Praze. Ctvr.ý sjezd ĉeškoslovenských espe an ístů v Teplicích-Šanově zdraví uctivě presidenta republiky. Za předsednictvo Profesor Murath. Trnovany.“

## Salutleteroj

Ing. Scholze legas la alvenintajn telegramojn kaj leterojn. Ilin sendis: Ministerstvo školství a národní osvěty, Praha Internacia Centra Komitato, Geneve Universala Esperanto-Asocio, Geneve Naciaj Asocioj: Belĝa, Biĥa, Dana, Estona, Germana, Hungara, Itala, Litova, Nederlanda, Norvega

Esperanto-Kongreso Tutpola, samtempe en Kraków Redakcioj de Heroldo de Esperanto kaj de Internacia Pedagogia Revuo S-ro Ĉe el Stockholm, F-ino Supichová kaj multaj kluboj kaj samideanoj ĉeĥoslovakaj.

## Salutparoladoj

S-ro Hagelmüller, sekretario de la Komerca Gremio, en ties nomo.

S-ro Kesík oficiale en la nomo de urbo Bratislava kaj de Slovaka Landa Tutisma Asocio. F-ino Yrjänäinen, en la nomo de finlandaj samideanoj.

S-ro Kudrna, en la nomo de Katolika Unuiĝo Esperantista en Praha.

S-ro H. Michálek, en la nomo de Universala Liĝo Pacifista.

Fermo de la kunsido 11.30 horo.

Sekvis fotografado.

## la LABORKUNSIDO

okazinta la 27. de majo en granda halo de la urba muzeo en Teplice.

Prilaboris sekr. VI. Brambora.

S-ro Dro Kamaryt malfermas la kunvenon je 14.45 horo kaj salutas ĉiujn ĉeestantojn, speciale s-ron Frenkel, konsulon de Finnlando, kiu venis per aŭtomobilo el Dresden. S-ro Frenkel resalutas.

Dro Kamaryt tralegas la tagordon de la kunveno, la ĉeestantoj akceptas.

## G. E. L.

Prof. Ing. Scholze el Liberec prezentas raporton pri la agado de Germana Esperanto Liĝo dum la pasinta jaro. Surtabule fiksitaj statistikoj bone montras al la ĉeestantoj la staton de GEL je fino de la jaro 1927. Ĝis tiu dato la Liĝo havis 740 pagintajn membrojn vivantaj en 155 lokoj. Por plifaciligi la propa-



gandan laboron estis fonditaj jenaj distrik-taj asocioj: Česká Lípa, Liberec, Norda Moravio-Silezio kaj Okcidenta Bohemio. La spertoj faritaj per tiu ĉi aranĝo estis bonaj. La Distrikta asocio Ĉ. Lípa aranĝis parolad-vesperojn de s-ro Ohlson el Svedujo en kelkaj urboj, sendis delegitojn al la Paska konferenco en Praha kaj bohem-saksa amika kunveno en Liberec. Plue ĝi fondis novan grupon en Steinschönau kaj plivigliĝis la movadon per reciprokaj vizitadoj. La Distr. asocio en Liberec aranĝis kursojn en Reichenau (fraŭlino Scholze) kaj Liebenau (s-ro Michalek). Organizis la bohem-saksan kunvenon kaj prizorgis la propaĝandon dum la Foiro kaj hotelfaka ekspozicio en Liberec. La Distr. asocio de Okcidenta Bohemio aranĝis la 6an ligan premian skribadon kaj kunvenojn en Karlovy Vary kaj Falknov. La gazetara servo ne funkcias ankoraŭ precize. Laŭ ricevitaĵ eltranĉaĵoj aperis 629 priesperantaj notoj en 67 germ. enlandaj gazetoj en 34 lokoj. Prof. Scholze esperas, ke estonte ĉiu faros sian devon, kaj akcentas la eksterordinaran gravecon de la gazetara servo, per kiu povas esti atingita pli favora publika opinio por Esperanto.

Oficiala instruado okazis en 5 germ. mezlernejoj kun 114 lernantoj, en 7 burĝaj lernejoj kun 311 lernantoj kaj en 1 popola lernejo kun 20 lernantoj. La hotelfaka lernejo en Mar. Lázně akceptis laŭ instigo de la Ligo esperanton kiel nedevidigan fakon en sian instruoplanon. Germanaj ŝtate ekzamenitaj ĝeinstruistoj estas 97, en la Ligo organizitaj instruistoj 127. Kursojn vizitis en 32 lokoj 760 personoj. Aŭtune estis aranĝita Esperanto-semajno dum kiu oni faris per kimenatografoj, parolad-vesperoj kaj per paroladoj de s-ro Ohlson sukcesan propaĝandon por nia afero.

Radiostacio en Praha dislaŭtiĝis paroladon de instruisto Hajek pri „40 jaroj de Esperanto“. La ligo partoprenis ankaŭ per delegitoj la Paskan konferencon en Praha kaj la kongreson en Danzig kaj la samtempe okazintajn kunvenojn de la Konstanta Repraŭntantaro. Dum la pasintjara ĉefkunveno la Ligo decidis starigi sur la tomo de s-ro Patzelt, la unua batalanto por Esperanto en norda Bohemio, modestan monumenton. La ŝtono jam estas mendita kaj la inaŭguro okazos nunjare la 22. Julio en Obergrund. Ĉiuj samideanoj estas invititaj partopreni. La oficeja laboro estis sufiĉe ampleksa. La prezidanto ricevis 792 kaj forsendis 354 korespondaĵojn. La Liga kasisino ricevis 342 kaj forsendis 512 korespondaĵojn. Dispartigo de detalaj laboroj kaj koncentriĝo de ĉefaj laboroj estu la devizo. Per ĉi sistemo oni interesiĝos pli da samideanoj por niaj laboroj kaj la movado ne bazuos sole sur kelkaj homoj. Ĉiu grupo zorgu pri kiel eble plej granda nombro de taŭgaj anstataŭantoj, kiuj, se estos necese, povu mem gvidi la aferojn.

Bone kaj precize funkciantaj naciaj asocioj estas neceseĝaj por solvi la estontajn taskojn. Sed ili povas nur tiam bone funkcii, se la grupoj kaj individuaj membroj subtenas la asociajn estrarojn. Esperu ni, ke ĉiuj esperantistoj ekkonos la gravecon de bona kunlaboro kaj forta organizo. Iom da bona volo kaj precizeco povas multe faciligi ĉiujn laborojn. S-ro prof. Scholze invitas en intereso de nia movado

ĉiujn ĝis nun neorganizitajn esperantistojn fariĝi membroj de GEL aŭ CAE. Li esperas ke la interŝanĝo de ideoj dum la kongreso montros novajn vojojn por sukcesa propaĝando kaj finas per la vortoj: Ni germanaj esperantistoj esprimas ankoraŭ specialan deziron, ke ekestu pli vigla kaj pli intima kunlaboro kun CAE en estonto. Nur kunigante niajn fortojn ni povos sukcese labori. Esperu ni je tiu ĉi sukceso!

Ĉ. A. E.

Sekvas raporto de s-ro Hromada pri agado de CAE dum 1927.

Koncerne la detalaĵojn s-ro Hromada rekomendas al interesuloj legi la detalan raporton pri CAE en la gazeto Progreso, okaze de la ĝen. kunveno en marto 1928. Mil membroj de CAE estu laŭ la raportanto la devizo de ĉiu ĉefa esperantisto. La nombro de anoj restis de 1925 ĝis 1927 preskaŭ la sama, kvankam la kotizoj plialtiĝis. Plua kresko estas verŝajna, tamen la komitato ne estas kontenta kun la nuna stato. Poste s-ro Hromada precizigas al ĉeestantaj germanaj samideanoj la organizon de CAE. Ĝi estas organizo de izoluloj, por la kotizo la membroj ricevas la laŭbezone apertan bultenon de CAE, librajn premiojn, propaĝandan materialon kaj lasttempe estis fondita laŭ ekzemplo de GEL Ekzamena Fondo. La raportanto substrekas la nepran necesecon de naciaj organizoj kaj admonas, ke ĉiu esperantisto estu organizita. La plialtigo de la kotizo en la pasintaj jaroj montris bonan rezulton por la organizo. La propaĝandon en la naciaj gazetoj prizorgis 50 fervoraj samideanoj kaj la rezultoj estas kontentigaj. La eltranĉaĵa oficejo sendas la priesperantajn notojn apertajn en la ĉefa gazeto. Ĉi tiu procedo estas malmultekosta kaj tre efika. Estas necese ke la publiko ofte legu pri Esperanto; favora publika opinio estas necesa, se la fina venko devas efektiviĝi per registara dekreto. Laŭ spertoj la rezultoj de propaĝando montriĝas kelkfoje nur post jaroj, tial neniu malesperu! Konsiloj kaj kunlaborantoj estas atendataj. Radiokurso en Brno havis tre bonan sukceson. En Praha la Radiostacio promesis aranĝi similan kurson. — La porpaca Paska Konferenco en Praha sukcesis bonege, ĉiuj pedagogiaj rondoj estis pri ĝi informitaj kaj ankoraŭ nun ĝi estas en faka instruista gazetaro menciata. Ĉi okaze la raportanto atentigas pri la granda merito de Dro Privat koncerne la sukceson de la konferenco. Instruado: Lektoratoj de Esperanto ekzistas ĉe la teknika altlernejo en Praha kaj mineja altlernejo en Příbram. Plue Esperanto estas instruata en la komercaj akademioj en Hradec Králové kaj Bratislava. Ŝtate ekzamenitaj estas nur malmultaj kaj sekve tre bezonaj. Pri neoficialaj kursoj de esperanto ne ekzistas statistiko, ĉar la aranĝantoj ne donas raportojn, kaj same okazas ĉe la ceteraj esp. aranĝoj. Al la ĉeestantaj kursestroj s-ro Hromada sciigas, ke estis fondita ĉe CAE sekcio junulara, kiun gvidas s-ro Novák. La kursestroj estas petataj respondi demandaron, kiun ili ricevis de la sekcio. S-ro Hromada deklaras sin preta ĉiujn demandojn respondi, neniu sin anoncas.

## U. E. A.

Komencante Sro Sklenčka, ĉefdelegito de UEA, atentigas, ke inter la pli novaj esperantistoj ekzistas malĝusta opinio pri UEA. La raportanto substrekas same kiel ambaŭ antaŭparolintoj la gravecon de la naciaj asocioj. La naciaj asocioj kvazaŭ fabrikas la esperantistojn, el kiuj poste UEA ĉerpas siajn kunlaborantojn kaj helpe de ili akcelas la praktikan uzadon de esperanto. La agado de UEA kaj de la naciaj asocioj do ne estas konkurenca, sed pli ĝuste paralela, sin reciproke kompletiganta. Fine estas danĝere diri, ke UEA aŭ iu nacia asocio ne estas necesa, kontraŭe ĉiuj tri devas esti kiel eble plej fortaj kaj kunlabori harmonie. La ĉefa kaŭzo de malcontento estas laŭ opinio de sro Sklenčka la kotizo. Tamen li rekomendas submetigon al la ekzistanta sistemo kaj ne estas kontraŭ akcelado de iu nova kaj plibona. — Sro Dro Lud. Goldberger el Praha atentigas, ke krom la menciitaj radioparoladoj okazis ankoraŭ du de sro Dro Ad. Bischitzky, estro de la Unuiĝo „Verda Stelo“ kaj ekzamenanto de la ŝtata ekz. komisiono de Esp., kaj unu de faka instruistino Jul. Šupichová. Ambaŭ parolis per radiostacio Praha.

## PROPONOJ.

Fino Scholze el Liberec prezentas du proponojn de „Esperanto Grupo Reichenberg“.

Unua propono pri kongreso:

Konsiderante, ke la preparoj de landaj kongresoj kaŭzas multan laboron, konsiderante, ke pro la malcerta nombro de partoprenantoj la aranĝo estas ĉiam finance riska, konsiderante, ke la montrita intereso por la kvar ĝisnunaj kongresoj estis proporcie malgranda, konsiderante, ke la nombro de la anaro de la ĝisnunaj kongresoj tute ne estis impona, la Esperanto Grupo Reichenberg proponas: estonte ne plu aranĝi landajn kongresojn, sed anstataŭi ilin per komunaj konferencoj de la estraroj de ĈAE kaj GEL.

Dua propono: Ĉiama kunlaboro de ĈAE kaj GEL estas ege dezirinda. Ambaŭ asocioj klopodu efektiviĝi aferojn, kiuj celas la diskonigon kaj disvastigon de Esperanto. Pro tio la Esperanto-Grupo Reichenberg proponas, ke

1) ambaŭ asocioj starigu fidindan statistikon pri Esperanto-instruado.

2) ambaŭ asocioj aranĝu ĉiujare samtempan Esperanto-semajnon (eble uzado de sama afiŝo, propaganda vojaĝo de eksterlanda esperantisto ktp.)

3) ili klopodu efektiviĝi la proponon de samformaj informtabuloj en la stacidomoj,

4) ili elserĉu taŭgajn metodojn por daŭra propaĝando en bankoficejoj, fremduloficejoj ktp.

5) ili kune zorgu por la ĝenerala enkonduko de Esperanto-instruado en la ĉiujgradajn lernejojn.

## Diskuto:

Sro Sklenčka konsentas, ke la landaj kongresoj okazas iom tro ofte, sed rekomendas, ke oni ne faru pli pluaj kongresoj ĝian devigan decidon. — Dro Kamaryt konsentas.

Sro Kesik, Bratislava, konsentas kun la propono, sed ĝi ne estu aplikata, se venos invito, kiu garantios sukcesan kongreson — alie kunvenu sole la estraroj de ambaŭ landaj asocioj. — Prof. Scholze konsentas ŝanĝi la proponon.

Sro Taubmann proponas, ke estu aldonata la rimarko, ke landa kongreso okazu almenaŭ ĉiun duan jaron, ĉar alie eble tute nenia plu okazus.

Sro Waldstein el Praha kontraŭas kaj deziras ke la kongreso okazu ĉiujare, ĉar ĝi estas tre bona propaĝando de Esperanto inter la indiferenta publiko. Ankaŭ ĉe la Universalaj Kongresoj oni jam pridiskutis la demandon kaj restis ĉe ĉiujara aranĝo de Kongreso.

Sro Taubmann: Publika propaĝando per Kongreso estas certe bona, sed la interna sukceso de la kongreso malgranda.

Sro Kudela, Olomouc: Se estas sukceso de kongreso certigita, ĝi okazu kiam ajn.

Sro Kudrna, Praha, estas por kiel eble plej ofta aranĝo de kongresoj, ĉar ili refreŝigas ĉiun veran samideanon.

Sro Pressburg, prezidanto de Esperanto & Komercio en Praha, subtenas la proponon de Liberec.

Sro Hromada, Praha, opinias, ke la propono estas farita, sub influo de Teplica ne sukceso kaj rigardas ĝin kiel nenecesan. La afero estu transdonita al la komitatoj de ambaŭ asocioj kiuj laŭcirconstance decidis, nenia formala propono estu akceptata.

Sro Scholze legas la ŝanĝitan unuan proponon:

La Esperanto-Grupo Liberec proponas, ke la landaj kongresoj okazu nur laŭbezono, prefere ĉiun duan jaron kaj la neokazantaj ĉiujaraj kongresoj estu anstataŭataj per komunaj konferencoj de la estraroj de ĈAE kaj GEL.

Ĉar neniu estas kontraŭ, la propono estas akceptita.

Ankaŭ la dua propono de Esperanto Grupo Liberec, koncernanta la kunlaboradon de ambaŭ asocioj, estas unuanime akceptita.

Sro Scholze proponas, ke la IV. Ĉeĥoslovaka Esperanto Kongreso renoviĝu la rezolucio de Esperanto Kongreso en Bratislava:

Por pliproksimiĝi la ĉeĥoslovakian esperantistaron al la organiza idealo, la IV. Ĉeĥoslovaka Kongreso denove akcentas, ke ĉiu esperantisto en ĈSR devas esti membro de unu el la propaĝandaj centroj. La kongreso solene deklaras, ke esperantisto estas por ni persono, kiu ne sole scias kaj uzas esperanton, sed ankaŭ helpas al la plua progresado de nia afero per aktiva kunlaboro, aŭ almenaŭ per materiala subteno, estante membro de ĈAE aŭ GEL.

Senŝanĝe kaj unuanime akceptita.

Dro Kamaryt proponas sendi dankan te-

legramon al la urbestro de Bratislava pro sendo de oficiala delegito al la IV. ĉsl. Esperanto Kongreso. Akceptita.

### Turismo & Esperanto.

Sro Sklenčka pritraktas ĉi tiun temon per pli longa parolado. Li rememorigas ke UEA renovigis la turisman servon kaj ke estas serĉataj kandidatoj, kiuj sin volus okupi speciale per tiu ĉi afero. La delegitoj de UEA devas ofte respondi multajn demandojn kaj por pliaciigi iliajn laborojn estas eldonataj la konataj gvidfolioj kiel antaŭ la milito. Okaze de eldono UEA sin turnas per speciala letero al la eldonanta turisma aŭ vojaga organizo, instigante al la esperanta eldono kaj preskaŭ ĉiam kun sukceso. —

Sro Scholze trovas la eldonadon de gvidfolioj d. z.inda kaj subtenas la aferon. — Sro Hromada proponas ke oni sendu koncernan rezolucion al la vojaĝ-kaj turismaj asocioj. — Sro Sklenčka proponas, ke oni kompiu la rezolucion, sed ke ĝi estu sendota nur kiam iu delegito ĝin postulas aŭ rekomendas. Akceptita.

Lau la tago de devis sekvi raporto de Sro Vořubec el Praha pri esperantista

### movado inter poŝtistoj.

La raportanto ne ĉeestas, sed li sendis la raporton per sro Hromada. Post kelkaj klarigoj kaj apelacio al la ĉeestantaj poŝtistoj, ke ĉiu interesiĝu pri sia faka esp. movado, sro Hromada sciigas, ke li volonte respondos ĉiun demandon, kiu koncernas la ĵus pritraktitan temon.

Sro Taubmann sciigas, ke ĉe GEL jam ekzistas poŝtista sekcio.

Sro Fritz Michalek opinias, ke fakaj societoj ne estas necesaj. Oni faru fakajn sekciojn ĉe la landaj organizoj sen plia kotizo.

Sro Hromada demandas, kiel oni poste volas solvi la aliĝon de la sekcianoj al jam ekzistanta internacia faka organizo. Ĉi tiu demando ne povas esti kontentige respondata.

Fino Krist en opinias, ke la estro de la faka sekcio povus esti sole ano de la inter. faka asocio.

Sro Kudela, Olomouc, diras ke la inter. fakaj asocioj devas havi ankaŭ rimedojn por povi ekzisti. Ĝi devas havi kotizantajn membrojn. Kaj sekve la aliĝo de sola sekciestro ne povas solvi la problemon.

Sro Brambora, Praha, opinias ke ĉiuj similaj pritraktoj kaj decidoj povas esti nur provizoriaj ĉar fine la koncernaj fakistoj ja mem decidus pri ilia organia malĉe.

Sro prof. Scholze deklaras, ke sekcia aranĝo estas kun sukceso apika a ĉe GEL koncerna instruistojn. Poste li klarigas la procedon de fondo aŭ disigo de esp. societoj. La ministerio por internaferejoj ĉiam antaŭe demandas la centran organizon kaj nur poste decidas.

La boninfluo de esperanto-instruado je la studentoj de fremdaj lingvoj.

Sro prof. Schneider, Karlovy Vary, raportas pri ĉi tiu faka temo. Li raportas kiel li sukcesis per faktoj konvinki la skeptikajn profesorojn pri la utilo kaj taŭgeco de esperanto dum studado de naciaj lingvoj. La raportanto jam 2 jarojn instruas esperanton ĉe la komerca akademio en Karlovy Vary kun bonegaj sukcesoj. Fine li proponas, ke estu sendita rezolucio

de la kongreso al la ministerio por instruado en la senco, ke la ministerio daŭrigu la favoran sintenon por esperanto kaj ke ĝi forigu ankoraŭ kelkajn malhelpaĵojn.

Prof. Scholze petas ĉiujn instruistojn, ke ili sendu ĉe fino de la jaro statistikon pri esperanto-instruado al la ministerio por instruado, kio al nia movado povas multe helpi. Poste li proponas ke la ambaŭ rezoluciojn por la ministerio de instruado, ( nome ia unuan ke estu daŭrigata la instruado de esperanto ĉe komercaj akademioj sen antaŭa kono de romanaj lingvoj, kaj la duan, ke estu permesata la instruado de esperanto ankaŭ en la aliaj lernejoj), kompiu kaj preparu Sroj Dro Kamaryt kaj prof. Schneider el Karlsbad. Ambaŭ sinjoroj akceptas kaj promesas prepari la rezoluciojn por la venontaga kongresa kunveno.

La taka prelego de sro Hiekl pri Esperanto inter la instruistaro estas translasata al la faka kunveno de instruistoj por la venonta tago.

La propono de sro Krysta koncernanta la saman takon estas laŭ propono de sro Sklenčka transdonita al sro Hiekl por komuna pritrakto dum la morgaŭa kunveno de instruistoj.

Sro Dro Kamaryt dankas al la ĉeestantoj por la grandnombra partopreno kaj finas la kunvenon je la 17. horo.

### Dimanĉe.

28. V. 1928. Antaŭtagmeze je la 9a katolika diservo en „Klosterkirche“ kun prediko esperanta de la pastro sro Czech, el Neudek.

### II. LABORKUNSIDO.

Je la 10a en „Kurhausveranda“. Prilaboris sekret. Dro Ludoviko Goldberger.

Prezidanto prof. ing. Gustav Scholze malfermas la kunsidon. Venis pluj telegramoj kaj leteroj de: Paneŭropa Unio, Sroj Adolf Stern, Bratislava; Ohlsson el Stockholm; Andreo Ĉe, el Stockholm; Juda grupo esperantista en Bratislava; Sveda esperanta federacio en Stockholm; Sro Halldor Nylen; Esperanto Asocio de Estonio en Tallin; Dr. Paulo Dolák, kanoniko dekanano, Spišské Vlachy.

Prof. Kamaryt priparolas kaj proponas jenajn tri rezoluciojn:

I. La IV. kongreso de esperantistoj ĉeĥoslovakaj en Teplice-Sanov — Teplice-Schönau dankas la ministerion de instruado pro la ĝisnuna boŭvo a afero pri esperanto kaj petas, ke tiu intereso ankoraŭ plip. o. undigu. Precipe ni permesas al ni, aŭdinte la raporton de prof. ing. J. Schneider pri boninfluo de p. esperanta instruado al sukceso en angla lingvo, kiun oni konstatis en germana komerca akademio en Karlsbad, diri insistan peton, ke: 1. esperanto restu envicigita inter la laŭordaj fakoj de la definitiva instruplano en komercaj akademioj; 2. ke estu en ĝi nuligita ordono, ke esperanto-instruadon povas partopreni sole studentoj finintaj du jarojn de instruado pri iu latinida lingvo. Konsento.

II. La IVa kongreso de ĉeĥosl. esperantistoj en Teplice-Sanov pritraktinte informojn, ke la instrua ministerio ne permesas instruadon de esperanto en duklasaj komercaj lernejoj, per-

mesas al ŝi postuli, precipe atentigante pri sia rezolucio pri komercaj akademioj, ke la ministerio permesadu esion de esperanto-instruadon en tiuj ĉi lernejoj almenaŭ en okazoj speciale motivitaj. Konsento.

III. La IVa ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso en Teplice-Sanov aŭdinte raporton pri la bona influo de esperanto-instruado por lerno de ceteraj lingvoj, precipe la angla kaj la franca, rekomendas al la instrua ministerio pri-rakti devigan enkondukon de esperanto-instruado en studplanojn de la elementaj kaj duaĝradaj lernejoj. Konsento.

Prezidanto Scholze: Nia Ligo GEL kaj CAE instigu la ministerion por instruado esprimi sian bonopinion al nia movado kaj admoni la malsuprajn aŭtoritatojn, prosperigi la Esperanto-aferon pri enkonduko en la lernejoj.

Sro Hromada aldonas, ke oni almenaŭ ne malhelpu la instruadon jam nun enkondukitan en lernejoj, kie troviĝas interesuloj.

Prof. Kamaryt proponas laŭ la spertoj en Praha (Přihoda), en Bratislava (Hendrych) kaj aliloke, la sekvantan rezolucion. Estis akceptita post kelkaj rimarkoj kaj ŝanĝoj de sroj Scholze, Löschner, Waldstein, Murath, Hromada:

La IVa ĉsl. kongreso esperanta en Teplice-Sanov pri-traktinte la bonajn spertojn kun esperanto-instruado petas, ke la instruado ministerio ĉe la kreo de la pedagogiaj akademioj aranĝu la studplanon tiamaniere, ke la studentoj povu partopreni esperanto-instruadon, almenaŭ se ili havas spontanee intereson por ĝi. Sed antaŭ faro de tiu ĉi reformo ni tre insiste petas, ke la ministerio permesu la instruadon de esperanto ankaŭ en la instruataj institutoj kaj industriaj lernejoj, se la pedagogiaj kondiĉoj tion ne tro malhelpas. Ni estas konvinkitaj, ke tiu laŭvola lernado de studentoj povus eĉ doni spertojn pri troaŭ netroŝarĝeco de studentoj, kiun ŝarĝon oni taksas tiom malfacile.

Sro Hromada parolas detale pri la gvidado de la Esperanto-aferoj, poste pri la radio-sendado, fine pri la kongreso Budapeŝta kaj prezentas la jenajn rezoluciojn:

1. Konsiderante la gravecon de la preciza informado kaj de la statistiko, la IV. ĉsl. Esperanto. kongreso esprimas alvokon al ĉiuj esp. laborantoj, ke ili regule kaj precize informu sian centron (CAE aŭ GEL) pri ĉiu esperanta laboro, farata en ilia loko, precipe pri la lerneja instruado kaj la publikaj kursoj. Konsento.
2. La IVa ĉsl. Esperanto-kongreso decidas aranĝi en 1929 en Praha la antaŭkongreson, okaze de la kongreso en Budapeŝta kaj petas I. C. K. envicigi tiun ĉi antaŭkongreson en

oficialajn aranĝojn kongresajn. Konsento.

3. Konsiderante la brilan sukceson de la esperanto-kurso elsendata de Radio-stacio Brno kaj konsiderante la petojn de la neesperantistaj radioamatoroj kaj la rekomendojn de la Internacia Radio Unio la IV. ĉsl. Esperanto-kongreso petas la Radiojournal en Praha elsendi la esperanto-kurson aŭtune el Praha-stacio, pli potenca kaj pli vaste aŭdebla en Bohemio. Konsento.

Poste la kongresa agado estis interrompita kaj la kunveno deklaris sin kunveno de UEA-anoj; nur tiuj rajtis paroli kaj voĉdoni. Prezidis D-ro Kamaryt. Sur la tagordo estis elekto de membro de la enketita komisiono, kiu kunsidis en julio en Genevo laŭ deziro de D-ro Privat, Prez. de UEA, por esplori la kritikojn de la administrado de UEA, ĉefe la flugfoliojn de S-ro Delanoue en Paris.

Post klarigaj vortoj de S-roj Skleněka, Hromada, Scholze, Kamaryt, okazis debato, kiun partoprenis S-roj Löschner, Kudela, Waldstein, k. a. La kunsido akceptas unuanime la jenan rezolucion, kiu esprimas la opinion de la ĉs. UEA-anoj pri la situacio:

Ĉeĥoslovaka esperantistaro, kunveninta ĉe la IVa. ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso en Teplice-Sanov la 26.-28. majo 1928, organizita en K. R. pere de siaj landaj societoj — Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj Germana Esperanto Ligo — kaj organizita individue en Universala Esperanto-Asocio:

1) sendas samideanan saluton al ĉiuj laboruloj alilandaj, oferantaj siajn tempon, energion kaj karieron por kreskigo de nia movado, kaj

2) speciale gratulas al UEA okaze de ĝia 20jara jubileo kaj al ĝia prezidanto D-ro Privat okaze de lia 25jara esperanta laboro,

3) opinias, ke la statutoj de niaj oficialaj organizoj ebligas demokratian kritikon, kiu povas alporti bonon al nia afero nur tiam, se ĝi estas farata en maniero paca, ne ofenda, objektiva, ne persona,

4) esprimas la esperon, ke la veraj laborantoj de la movado ne hezitos daŭrigi en siaj klopodoj por firmigi kaj kreskigi ĉion, kion la movado jam atingis.

Post interkonsila debato la kunveno elektas kiel komisionanon por la Genevaj kunsidoj D-ron Stan. Kamaryt el Bratislava. Por la okazo, ke li ne povus veturi, la kunveno petos S-ron Rud. Horn el Krnov anstataŭ lin.

#### FINO DE LA KONGRESO.

S-ro Kudela: Mi kore invitas la sekvontan kongreson en nian urbon Olomouc en la nomo de nia grupo. Mi dankas al la aranĝintoj de nia nuna kvara kongreso korege pro ilia granda kaj sukcesplena laboro en nia komuna afero. (Aplaŭdado.)

Prezidanto Scholze: Koran dankon en la nomo de la kongres-estraro kaj de ĉiuj ĉeĥoslovakaj samideanoj, germanaj same kiel ĉeĥaj, al la laborema loka komitato, kaj al la ŝatafaj: prof. Murath, direktoro Löschner, K. Juhn, fino Gertrud Grund. (Aplaŭdado.) Mi finas nian kvaran ĉeĥoslovakon Esperanto-kongreson.

Posttagmeze: ekskurso al Eichwald-Dubi (Tupelburg).